



Programlibro SES 2019



Organizantoj



Peter Baláž – Petro (SK)
Ĉeforganizanto de la aranĝo



Dorota Rodzianko (PL)
Financoj, administrado



Matthieu Desplantes (FR)
Retpaĝaro, kinejo, teknikaĵoj




Kryštof Klestil (CZ)
Somera Esperanto-Programado



Michal Grodza (SK)
Instruistoj, sporta programo



Edoardo Nannotti (IT)
Manĝkuponoj, surloka helpo



Katarína Nosková (SK)
Ekskursoj




Peter Holba (SK)
Libroservo, ekskursoj



Pavol Petrík (SK)
Ekskursoj



Anita Bernerová (SK)
Trinkejo



Salomé Hug (FR)
Surloka helpo



Léa Pillot-Colin (FR)
Surloka helpo



Ekaterina Lozina (RU)
Surloka helpo



Marta Tikhomirov (PL)
Surloka helpo

Lingvokursoj: Instruistoj

SES-organizantoj estas ĝojaj kaj fieraj povi prezenti al vi la plej grandan internacian instruistan teamon dum la nuntempe plej granda somera Esperanto-lernejo. La instruistoj estas por SES la plej gravaj personoj – ili venas, por ke vi foriru de la aranĝo pli riĉaj je novaj scioj, por ke via Esperanto-nivelo signife kresku dum tiuj ok tagoj. Ni tre petas, obeu ilin, lernu diligente kaj pruvu al ili kaj al vi mem, ke ili ne venis vane! Por ke ni povu gastigi ilin ankaŭ dum la venontjara SES!

Nivelo A1



Víctor Solé (Katalunio)

Nivelo A2



**Christophe Chazarein
(Francio)**

Nivelo B1




**Arina Osipova
(Rusio)**

Nivelo B2



**Tim Morley
(Britio)**



**Szabolcs Szilva
(Hungario)**

Niveleoj C1–C2



Konstantin Tikhomirov (Rusio/Pollando)

Aliaj kursoj

Esperanto-literaturo kaj kulturo

Per Esperanto eblas ne nur ami kaj kvereli, kunsidi kaj forgesi akuzativojn, sed ankaŭ verki literaturajn tekstojn. Jam ekde Zamenhof en nia lingvo estiĝis poemoj, romanoj, noveloj kaj tiel plu ĝis kanto-tekstoj rande de beletro. Venu al nia kurso, kaj vi kleriĝos pri literaturo en Esperanto kaj ni montros al vi kiel verki (mal)bonan poemon!

Surbaze de la deziroj kaj de la konsisto de la partoprenantoj, ni traktos diversajn temojn, ekzemple:

- Enkonduko al la t.n. E-kulturo kaj E-literaturo, konkrete al la originalaj poezio kaj prozo kaj al la periodoj de la originala E-literaturo (laŭ Sutton).
- Aparta pritrakto de pluraj gravaj aŭtoroj kiel William Auld, Baldur Ragnarsson, Roberto Passos Nogueira, Mauro Nervi, Mao Zifu, ktp.
- Tradukado de beletraj tekstoj.
- Rilato inter kantotekstoj kaj poezio.
- Redaktado de internacia kultura kaj literatura revuo (kun Beletra Almanako kiel aktuala ekzemplo).
- Eldonado de E-libroj.
- Recenzado de beletraĵoj.



Oleg Ĉajka, konata ankaŭ kiel Oĉjo, estas rusia kaj ukraina esperantisto: poeto, kantisto, tradukisto, instruisto. Li naskiĝis en 1973, kaj loĝas en Moskvo de 1995. Li lernis Esperanton memstare en 1987. En 1989 li komencis verki kaj traduki poemojn kaj kantojn. Li mem kantas siajn (kaj ne nur siajn) kantojn. Liaj verkoj aperis en diversaj Esperantaj periodaĵoj kaj poemaroj. Li estis laŭreato de kelkaj artaj festivaloj EoLA.

Li instruis Esperanton kaj partoprenis en organizado de multaj Esperantaj renkontiĝoj. Li aktivis en SEJM, REJM kaj TEJO. Li estas aktivulo de la moskva junulara klubo EK MASI ekde ĝia apero en 1995.

De 2006 li estras en Moskvo kurieran firmaon kun Esperanta nomo “Kontakt”, kiun li fondis. De 2017 li estras kune kun Arina Osipova la tradukfirmaon “Lingvo Connect” en Moskvo.

Somera Esperanto-Programado

Paralele al matena instruado okazos unuan fojon Somera Esperanto-Programado, la unua Esperanta kodummaratono.

Kodummaratono (angle *hackathon*), kiun oni ankaŭ foje nomas kodumtago, kodumfesto aŭ kodfesto, estas fasona sprinteevento, dum kiu programistoj kaj aliaj fakuloj de program-kreado, inkluzive de grafikistoj, interfaccasnistoj, projektmanaĝeroj kaj aliaj, intense kunlaboras pri komputilaj projektoj. La celo de kodummaratono estas krei funkciantan programaron aŭ aparataron fine de la evento. Kodummaratonoj kutimas havi specifan temon, kiu povas esti programlingvo, aplikaĵo, API. Foje limigoj entute ne estas. Fine de la evento oni prezentas sian projekton.



Priskribo de program-kontribuantoj

Eda Nano

Mi estas komputikisto, loĝas en Francio, kaj ŝatas liberan programaron, ĉar tio estas kiel Esperanto, tio permesas uzon, komprenon, kundividon kaj pliboniĝon.




Ekaterina Lozina (Miri)

Mi estas jogemulo, kroĉetemulo, manfaremulo, katemulo, kafemulo, ŝatas lerni novajn aferojn kaj aĵojn kiuj helpas pliriĉigi kaj plibeligi vivon. Mi estis en Slovakio milojn da fojoj kaj daŭre ŝatas vizitadi la landon. Kaj SES-on. Ĉu ankaŭ vi?

Ewa Grochowska

... naskiĝis en la okcidenta parto de Pollando sed ses jarojn poste la familio transloĝiĝis al Bjalistoko. Ŝiaj gepatroj estis fervoraj esperantistoj. La patrino gvidis Esperanto-kursojn do ankaŭ Ewa profitis la kurson por komencantoj. Dum la jaroj de studado kaj laboro ŝi forlasis Esperanton. Ĝi revenis en ŝian vivon kiam ŝi jam loĝis en Francio. Nun ŝi estas aktiva membro de Asocio Esperanto-Grenoble. Unu el ŝiaj ŝatokupoj estas verkado. Ŝiaj verkoj estis plurfoje premiitaj en Belartaj Konkursoj. De kelkaj jaroj ŝi interesiĝas pri Aŭrovilo (la urbeto, kiu situas en la suda parto de Barato) pro ĝiaj apartaj spiriteco kaj funkciado.




Kamil Getka, Maria Sułkowska

Ni venas al Varsovio (el Pollando), kie niaj pasioj vekiĝas. Maria studas elektoradiologion, kaj Kamil fremdajn lingvojn. Ni interesiĝas pri la latinamerikaj dancoj kaj kunikloj.

Katarína Nosková

...estas aŭtorino de kurso de la slovaka por alilingvanoj Slovake.eu. Ŝi tradukas kaj provlegas librojn kaj nuntempe ŝi verkas komputilan kurson por plenaj komencantoj. Al ŝiaj ŝatokupoj apartenas libroj (ĉefe de Terry Pratchett), batalartoj, lingvoj kaj bredado de testudoj. Dum la patrino libertempo ŝi decidis kiel eble plej multe redukti la kvanton de la ĉiutage produktataj rubaĵoj. Tiam ŝi malkovris vaksajn tukojn, kiuj multe helpas ĉe komenco de tiu ĉi malfacila vojo.



Konstantin Tikhomirov

...devenas de Rusio, sed ekde 10 jaroj li loĝas en Pollando. Li finstudis pedagogion kaj slavan filologion (ĉeĥa, kroata kaj ukraina lingvoj). Nuntempe Konstantin laboras en granda logistika firmao en la posteno de departamentestro. Li interesiĝas pri sciencfikcia kaj historia literaturo, tabulludoj kaj fremdaj lingvoj. Li partoprenas SES ekde 2011 kaj instruas en ĝi ekde 2012.

Kryštof Klestil

La plej krianta ŝtofo, kiun vi iam ajn renkontos. Li naskiĝis kun trikiloj en siaj manoj, liaj lipharoj kreskis en la unua monato de lia ankoraŭ mallonga vivo, nuntempe li kudras, onidire kantas, desegnas, fasonas, scivolemas pri la senco de la vivo tro ofte kaj ĉiam venas al la sama verdikto, ke simple estas sensenca ĝuado de nenio kaj ĉio samtempe.



László Szilvási

...estas esperantisto ekde sia 14-15-a jaraĝo kaj plenumis plej diversajn postenojn – de aktivulo ĝis prezidanto – en la nacia kaj internacia E-movado. Laŭfake elektronika inĝeniero, ekonomikisto, merkatikisto, entreprenisto. Pli ol 30 jarojn li estas plentempa esperantisto (verŝajne la plej longtempa en tiu kategorio), nuntempe en la kadro de sia entrepreno Lingvo-Studio li gvidas la agadon de (ĉu la plej granda?) Esperanto-Lingvolernejo, kaj funkciigas la Budapeŝtan Esperanto-Centron.

Léa Pillot-Colin

Mi parolas la francan ekde iom da tempo kaj Esperanton ekde eĉ malpli da tempo. 21-jara, el Normandio. Nehovorím po slovensky.



Magdaléna Feifíková (Fejfi)

Fejfi komencis esperantumi en la jaro 1987. Unue redaktis la kluban bultenon *Raportanto*, pli poste la landan bultenon *Esperantisto Slovaka*. Gvidis la Slovakian Asocion de Fervojistaj Esperantistoj kaj organizis krom aliaĵoj la Internacian Fervojistan E-Kongreson en Košice en la jaro 1997. Partoprenis multajn fervojistajn kaj kelkajn universalajn kongresojn, krome multajn aliajn E-aranĝojn. En lastaj jaroj ŝi okupiĝas pri instruado de Esperanto.

Mária Minichová

...estas slovaka instruistino. Ŝi ekkonis Esperanton meze de la 90-aj jaroj kaj aktivas en la slovaka Esperanto-movado. Ŝi organizas lokajn klubajn turismajn kaj kulturajn aranĝojn, ekspoziciojn, prelegojn kaj lingvokursojn. Ŝi zorgis pri la Esperanto-versio de la dulingva romano *Ĝis tien – Až tam* kaj tradukis kolekton de tutmondaj fabeloj el la ĉeĥa por radio Muzaiko.



Maria Pokrzywnicka



1953, muzeistino, gvidantino de la Eduka Fakoj en Etnografia Muzeo en Toruń/Pollando. Dum multaj jaroj (1985-1995) mi laboris kiel kunorganizantino de Internaciaj Renkontiĝoj de Popolaj Orkestroj kun uzo de Esperanto kiel pontlingvo (aranĝo kreita de Teresa Nemere, vaste konata Esperantistino kaj mia muzea mentoro). Nun mi respondecas je la muzeaj edukaj programoj por diversaj grupoj: infanoj kaj junularo, lernejoj kaj instruistoj, studentoj, turismaj grupoj en tio por eksterlandanoj, pliaĝuloj kaj pri speciala trejnado por muzeaj edukistoj. Kiel aŭtorino de multaj aranĝoj, renkontoj, prelegoj kaj artikoloj teme kunligitaj kun profilo de Muzeo, mi ankaŭ prilaboras diversajn renkontojn pri Esperanto kaj Esperanta kulturo kiel kultura fenomeno. Uzante kiel argumentadon la enskribon de

Esperanto sur Pola Listo de Nemateria Kulturheredaĵo (2014) mi sukcesis ĉijare organizi kaj gvidi la unuan oficialan muzean kurson pri Esperanto por komencantoj. En Muzeo, temo pri Esperanto ofte aperadas por neesperantistara publiko, ankaŭ dum intervjuoj por amaskomunikiloj. De kelkaj jaroj mi aktiviĝis kiel prelegantino pri muzea agado por kaj per Esperanto por esperantistaro (i.a. en Gdańsko, Vroclavo, Birŝtonas, Krakovo, Poznano).

Marta Nowakowska

...devenas el Pollando kaj doktoriĝas pri neŭroscienco en Munkeno. Ŝi lernis Esperanton dum SES en 2018. Ŝi estas tre *kawaii* kaj ŝatas piedpilkadon, hundojn, teon, japanan kulturon kaj filmojn tiom malbonajn, ke ili estas bonaj.



Marta Tikhomirov

...devenas de Pollando. Ŝi finstudis veterenarian medicinon ĉe Vroclava universitato kaj nun doktoriĝas pri toksikologio kaj farmakologio. Marta interesiĝas pri ekologio, tabulludoj kaj vojaĝoj. Marta eklernis Esperanton en 2013 kaj regule kontribuas al SES ekde 2014.

Martin Sedlák

...estas Ĉeĥa esperantisto el Brno. Li partoprenas esperantajn renkontiĝojn ekde SES 2014. Li laboras en nuklea elektrejo, kaj interesas pri elektrotekniko kaj elektroenergetiko, sed en libera tempo li ankaŭ ŝatas legi pri historio.



Matthieu Desplantes

Matthieu estas el Francio sed loĝas en Slovakio ekde 2013. Li studis komputikon dum kvin jaroj en Parizo kaj nun laboras kaj pri komputiloj, kaj pri lingvoj. Li ŝatas lingvojn, vojaĝadon kaj kuiradon.

Oleg Ĉajka (Oĉjo)

...estas rusia kaj ukrainia esperantisto: poeto, kantisto, tradukisto, instruisto. Li naskiĝis en 1973, kaj loĝas en Moskvo de 1995. Li lernis Esperanton memstare en 1987. En 1989 li komencis verki kaj traduki poemojn kaj kantojn. Li mem kantas siajn (kaj ne nur siajn) kantojn. Liaj verkoj aperis en diversaj Esperantaj periodaĵoj kaj poemaroj. Li estis laŭreato de kelkaj artaj festivaloj EoLA.



Paulína Kožuchová

Paulína loĝas en Bratislavo, kie ŝi laboras kiel instruisto. Ŝi aktivas pri feminismo, GLAT-aj rajtoj, bestaj rajtoj, kaj socia justeco. Ŝi estas kunfondinto de www.egalecen.org.

Pavol Petrík

Longjara tradukisto pri la angla kaj Esperanto, korektisto kaj redaktoro de *Esperantisto Slovaka*, interpretisto de la slovaka en Esperanton dum Esperanto-ekskursoj.




Peter Baláž

Peter Balaž estas slovaka esperantisto kaj eldonisto loĝanta en Partizánske, kunordiganto de la edukprojekta asocio E@I (ekde 2005) kaj ĉeforganizanto de eventoj SES, KAEST kaj Polyglot Gathering. Nuntempe li estas ankaŭ prezidanto de Slovaka Esperanta Federacio (SKEF). Li estis estrarano de Eŭropa Esperanto-Unio, prezidanto de SKEJ (kiun kunfondis) kaj ankaŭ kunfondinto de Wikimedia Slovenská republika.

Signe Capion, René G. M. Nielsen

Ni estas nerdoj pri korpa movado kaj precipe pri balancado kaj portado unu de la alia – kaj eble ankaŭ vi?

Dum la lastjara SES, ni partoprenis en nia unua Esperanta aranĝo kaj ŝajne ĝi ne estis la lasta. Antaŭ tiam ni lernis Esperanton nur rete; René ekde aŭtuno 2016 kaj Signe nur monatojn antaŭ la aranĝo.



Tim Morley

Tim Morley instruas Esperanton, la anglan kaj la francan de antaŭ 20 jaroj. Li instruas ĉe SES ĉiujare ekde 2012. Ekscitas lin reciklado, lingvo-scienco, ekkoni novajn homojn kaj aferojn, kaj stultaj vortludoj.

Václav Zouzalík

Václav Zouzalík estas komputilisto el Ĉeĥio kun intereso pri persona libereco, historio kaj lingvoj.



Victor Grousset (tuxayo)

Mi estas komputilisto el Marsejlo, suda Francio, aktiva pri libera programaro kaj OpenStreetMap (kunlabora libera mapo de la mondo). Tradukas kelkajn programojn en Esperanto. Mi laboras en firmao, kiu faras liberajn programojn por bibliotekoj.

Priskribo de programeroj

La detalan programon kun ĝustaj horo kaj ejo bv. konsulti en la programtabulo!

☺ = taŭga por komencantoj / suitable for beginners

Akrobata joko (akrojogo) por komencantoj ☺

Akrobata joko kombinas la trankvilon kaj koncentriĝon de joko kun la luda kunlaboro de akrobatado. Surbaze de ekvilibro kaj kunlaboro ni instruas al vi kiel flugi sur kaj kun aliaj personoj. Neniuj specialaj kvalifikaĵoj estas necesaj. Kunportu propran jogotapiŝon aŭ dormomaton! La du lecionoj havos iomete malsaman enhavon, do eblos partopreni en ambaŭ se oni volas praktiki plu. Tamen akrojogokomencantoj estos bonvenaj ambaŭ tagojn.

Gvidas: Signe Capion, René G. M. Nielsen

Aŭrovilo – ĉu taŭga loko por Esperanto?

Temas pri vilaĝo fondita en la jaro 1968 en Tamulio, kies funkciado baziĝas sur la spirita, tamen senreligia, instruado de Sri Aŭrobindo (hinda filozofo, jogano, verkisto) kaj Patrino (klera, altspiritita francino). En la jaro 1988 la Hinda Parlamento atribuis al tiu urbeto laŭleĝan statuton, unikan en la mondo ĉar, kiel deklariĝis en la Ĉarto, Aŭrovilo estas propraĵo de la tuta homaro. Aŭrovilo estas ankaŭ mondfama eko-vilaĝo, loko de sciencaj esploroj, alternativaj terapioj, alternativa edukado kaj loko de “realiĝantaj revoj”. En tiu loko vivas pace pli ol 3 000 personoj el 58 landoj. Ĝi havas la subtenon de Unesko.

Prelegas: Ewa Grochowska

Burunda lingvo

La burunda lingvo (*kirundi*) estas oficiala lingvo de Burundo, la sola parolata kaj komprenata de la norda parto ĝis la sudo, alivorte komprenata de cxiuj burundanoj. Ĝi apartenas al la bantuaj lingvoj kaj similas al la ruanda (*kinyarwanda*), kaj aliaj multaj dialektoj uzataj en Kongolando, Ugando, Tanzanio kaj en aliaj landoj de la suda kaj orienta parto de Afriko. La lingvo estas simpla, kaj havas akcenton kiel la internacia lingvo. Ĝi uzas la latinan alfabeton. La popolo kun sia lingvo havas kulturon de paco. Ni lernos kelkajn bazajn vortojn kaj esprimojn.

Prelegas: Jérémie Sabiyumva

Cifereca liberigo: kiel uzi pli respektindajn ciferecajn ilojn?

Prenu viajn komputilojn kaj telefonojn, ni helpos liberigi ilin de Gmail, WhatsApp, Facebook, Twitter, reklamoj, spuriloj... per liberaj kaj etikaj alternativoj.

Celoj:

- privateco
- libera programaro / malfermkoda programaro

Ekzemploj:

- havi retadreson ĉe neaĉa provizanto
- uzi pli sekurajn kaj pli etikajn mesaĝilojn en telefonoj kaj komputikoj
- ŝanĝi serĉilon ĉar ne ekzistas nur Google
- uzi etikajn sociajn retojn paralele al la tradiciaj
- eldoni filmetojn
- kundivi bildojn
- retumilaj kromprogramoj por bloki aĉaĵojn en retejoj
- uzi specialan anoniman retumilon por ne cenzuri sin mem pri tiklaj temoj (Tor Browser)
- kontaktoj kaj agendo spegulitaj kun saĝa telefono
- havi spegulitajn dosierujon inter pluraj komputiloj (alternativoj al Dropbox kaj Google Drive)

- instali liberajn aplikaĵojn en poŝtelefono
- diskutoj pri kiel financi pli tiujn ilojn
- uzi liberajn mapservojn bazitajn sur OpenStreetMap (kiel Vikipedio sed por mapaj aferoj)

Prelegas: Eda Nano kaj tuxayo

Ĉeĥa lingvo


Unuhora kurseto de la ĉeĥa lingvo. La ĉeĥa estas la plej proksima lingvo al la slovaka. Ni lernos la alfabeton, utilaj frazojn, kaj ni finos per kelkajn langrompilojn.

Prelegas: Martin Sedlák

Danckurso de ĉaĉao-danco – bazaj figuroj ☺

Ni intruos la bazan movon kaj kelkajn figurojn de amorveka ĉaĉao. Ne gravas ĉu vi estas sola aŭ ne, ĉar multe da figuroj estas la samaj (spegule) por ambaŭ dancantaj personoj.

Gvidas: Kamil Getka, Maria Sułkowska



Esperanto-eventoj ☺

Ekzistas multaj Esperantaj eventoj kaj renkontiĝoj. Ĉu vi konas iun? Ĉu vi scias kiel trovi informojn pri ili? Scivolemuloj venu por ekscii kie eblas ĝui Esperanto-etoson!

Prelegas: Dorota Rodzianko

Esperanto-literaturo – ĉu ni daŭre bezonas ĝin?

Ĉu vi ŝatas legi? Kaj ĉu vi legas Esperanto-verkojn? Aŭ vi pensas, ke nenio interesa eldoniĝas en Esperanto? Ĉu kaj kial estas bezonate legi Esperanto-literaturon? Kia estas la estonteco de la Esperanto-literaturo? (En la mondo de ciferecaj libroj sed same en la tempo de apenaŭa legado en plejparto de la mondo.) Kiaj estas la defioj de verkado, tradukado kaj eldonado de Esperanto-literaturo? Venu diskuti la estontecon (kaj nuntempon) de la Esperanto-literaturo – kune kun eldonistoj, verkistoj kaj legantoj.

Prelegas: Peter Baláž, Oĉjo

Esperantujo for beginners ☺

So, you are learning Esperanto or are already speaking it?

Great! Now let's discover the Esperanto world a bit!

What's going on in Esperantujo?

In this session you will find out what the most important Esperanto meetings are; what to expect from a “Gufujo” and an “Internacia vespero”; how you can connect with other Esperantists (online and offline); which Esperanto organizations are out there and finally what all those damn abbreviations mean (like IJK, JES, TEJO, UK, PIV, PMEG, TAKE, IJS, ...). The session will mainly be in English.

Prelegas: Paulína Kožuchová



Familiaj radikoj – Mia famili-esplorado de Eŭropo ĝis Aŭstralio kaj Ameriko, de la 17-a jarcento ĝis nun

Ĉu vi jam kreis famili-arbon? Ĉu vi jam esploris la historion de via familio? Ĉu vi scias, de kie vi devenas? Ĉu vi volas ekkoni familiajn sekretojn de viaj prauloj? – Jen la demandoj al kiuj mi serĉis respondojn, kiam mi komencis esplori. Mi ne sciis, ke la propran historion eblas reveki eĉ de la 17-a jarcento kaj ke miaj familiaj historioj ĉeestas eĉ en tri kontinentoj. Se vi volas ekkoni la plej interesajn aferojn kaj ŝatus ekscii kiel vi mem povas ekkoni vian historion, venu al mia prelego!

Prelegas: Szabolcs Szilva

Instruado de slovakaj popolkantoj en Esperanto ☺

Ĉu vi ŝatas kanti kaj amuziĝi? Tiam venu lerni kun ni novajn kantojn en Esperanto, ĉu origine Esperantajn, ĉu tradukitajn el aliaj lingvoj. Bona maniero por lerni lingvon, amuziĝi kaj kunkanti :-)

Gvidas/Instruas/Ludas: Mária Minichová

Jogo ☺

Ni lernos kiel jogumi kun atento al sia korpo kaj kiel laŭeble eviti traŭmojn. Kaj kompreneble kiel ekzerci kaj farti pli bone. Tio ne estas sporta konkurso, ĉiuj niveloj estas akcepteblaj.

Gvidas: Miri

Kial ni malŝaltis Vikipedion: EU-reformo de kopirajto

En marto de tiu ĉi jaro Eŭropunia Parlamento decidis pri nova direktivo pri kopirajto. Kelkajn tagojn antaŭe kvar lingvaj versioj de Vikipedio protestis per sia malŝalto. Kial? Ĉu la novaj protektoj estas oportunaj aŭ baraj por liberaj scio kaj kulturo? La prelegonto kunestris malŝalton de ĉeĥlingva Vikipedio.

Prelegas: Václav Zouzalík

Kroĉetado ☺

Per kroĉetiloj oni povas krei ĉion. Vere. Vestaĵojn, ludilojn, sakojn, tukojn... Kroĉetitaj ŝuoj? Kial ne?! En nia manfarejo ni lernos fari la plej bazajn aferojn kaj maŝojn sed eĉ tio sufiĉos por realigi amason da viaj ideoj.

Gvidas: Miri

Kurso de la franca

La franca, tiu lingvo neklarigebla kaj plena de silentaj literoj, skribata kaj parolata de la plej grandaj poetoj kaj legata kun pasio kaj amo, tiu lingvo, kiu ebligas al vi mendi ranajn krurojn kaj trovi la Eiffel-turon pli rapide ol la aliaj – tiun lingvon mi parolas kaj priparolos en facila kurseto, kie vi lernos kiel prezenti vin. (Havi telefonon estas rekomendate por partopreni.)

Prelegas: Léa Pillot-Colin

Kurso de la slovak

Ekkonu iomete la lingvon de la lando, kie vi pasigas semajnon! Dum ĉi tiu leciono vi lernos kiel elparoli slovakajn vortojn, utilajn frazojn kaj interesaĵojn pri la lingvo.

Prelegas: Matthieu Desplantes

La Ĉambro

La Ĉambro (angle: *The Room*) estas usona drama filmo el la jaro 2003. Farita preskaŭ plene de unu persono, kiu agis kiel reĝisoro, scenaristo, produktisto kaj ĉefaktoro, ĝi estas konsente akceptita de kritikoj kiel malbonkvalita. Tamen ĝi gajnis dum jaroj multajn fidelajn ŝatantojn kaj fariĝis nekredebla tutmonda fenomeno. En tiu ĉi prelego ni ekkonos la historion malantaŭ la verko kaj ĝia aŭtoro, kaj ankaŭ priparolos kialojn por la nuna granda populareco de la tiel nomata “*Citizen Kane* de malbonaj filmoj”.

Prelegas: Marta Nowakowska

Magic: The Gathering (prelego)

Magic: The Gathering (*Magio: La Kolektado*), aŭ simple MTG, estas la unua kaj la plej populara KKL – kolektebla karta ludo en la mondo. Ĝia unua eldono aperis en 1993 en Usono kaj dum la lastaj 25 jaroj ĝi konkeris la merkaton de tabulaj kartludoj. *Magio: La Kolektado* estas fantazia kartludo,

en kiu ĉiu ludanto estas sorĉisto, batalanta kontraŭ aliaj magoj uzante sian sorĉbibliotekon, reprezentitan de sia kartaro. La ludo estas unike diversa, ĉar ĉiu ludanto mem konstruas sian kartaron el miloj da ekzistantaj kartoj, aldonante unikan strategion al sia ludo. En tiu ĉi prelego vi ekkonos la historion de la ludo kaj ekkonos ĝian strukturon kaj la komunumon de la ludantoj. Se vi volus provi ekludi *Magion*, estu bonvena al la ateliero pri *Magic: The Gathering*.

Prelegas: Konstantin kaj Marta Tikhomirov

***Magic: The Gathering* (ateliero)**

Sendepende de tio, ĉu vi iam ludis *Magion*, aŭ ĵus eksciis pri la ludo de la prelego – dum tiu ĉi ateliero vi povos provi ekludi ĝin. Ni klarigos la bazajn regulojn kaj donos al vi kartaron, uzante kiun, vi tuj povos ekludi kontraŭ aliaj partoprenantoj. Ne hezitu ekĝui la plej popularan kolekteblan kartan ludon en la mondo!

Gvidas: Konstantin kaj Marta Tikhomirov

Malgranda fina venko de Esperanto – kaj posta velko en Hungario

Antaŭ kelkaj jaroj en Hungario realiĝis malgranda “fina venko de Esperanto”! Por ricevi siajn diplomojn en universitato, studentoj devas trapasi ankaŭ ekzamenon pri iu lingvo – kaj eblas elekti ankaŭ Esperanton. En la pasintaj jaroj pli ol 50 000 (!!) studentoj lernis Esperanton kaj 34 000 trapasis sukcese la meznivelan KER-B2 ekzamenon! Tiu kvanto tamen levis seriozajn problemojn pri provizado de lerno-materialoj, vortaroj, instruistoj, k.a... En la lastaj jaroj aperis tre zorgiga fenomeno: universitatoj komencis unu post la alia rifuzi la akcepton de Esperanto – kaj ilian kritikon estas tre malfacile oponi... Draste falis la nombro de la kursanoj, la hodiaŭa kvanto estas nur 30 % de la pli fruaj valoroj – kaj la perspektivo estas tre malhela. La tradiciaj Esperanto-organizoj nur agonias, ne plu restis kapablaj aktivuloj ĉe ili, ĉiu iris instrui la lingvon kontraŭ mono...

Tiu hungaria fenomeno pri “venko – malvenko” verŝajne ripetiĝos en ĉiu alia lando, kie eble iam Esperanto sukcesos prosperi. En la prelego mi klopodas mallonge prezenti la situacion, la frontitajn problemojn – kaj eventuale transdoni mian personan sperton.

Prelegas: László Szilvási

Ni lernu la kartvelan alfabeton ☺

La kartvela lingvo (*Georgian, gruzinĉina, ქართული ენა*) estas skribata per alfabeto unika, bela kaj, male al kion vi povus pensi, sufiĉe facile lernebla. En mia leciono vi lernos ĉiujn 33 literojn kaj vi poste scios, kiel elparoli kartvelajn vortojn kaj kapablos trovi konatajn vortojn en kartvela teksto.

Prelegas: Matthieu Desplantes

მოდიოთ
ვისწავლოთ
ქართული
ანბანი!

Nitraj legendoj

Vi konatiĝos kun legendo pri la romanika preĝejo de sankta Miĥaelo Ĉefanĝelo, kiu staras sur kruta monteto en la proksima vilaĝo Dražovce. Vi ekscios, kiun moralinstruon heredigis al siaj tri filoj la reĝo Svätopluk, kiamaniere ekestis en Nitro la unua kristana preĝejo konstruigita de la pagana princo Pribina, kio okazis kun Vazil, kies nomon portas la kastela turo. Vin timigos la lokaj fantomoj. Kaj ĉefe, vi ekscios, lau kiu ricevis sian nomon la loka biero Corgoň.

Prelegas: Fejfi

Novajoj de E@I

E@I ekde sia komenco antaŭenigadas edukadon diversmaniere kaj diversforme – retejoj, aranĝoj, eldonaĵoj, kampanjoj... En nuna momento venas tempo por eĉ pli da aktivecoj en tiu ĉi kampo kun plia profesiiĝo, oficiala rekonado kaj pli vasta kunlaboro. Prezentitaj estos la plej freŝaj atingoj kaj



la plej aktualaj edukaj projektoj.

Prelegas: Peter Baláž

Peĉakuĉo: “Ĝenerala” kaj “Esperantujo”

Kio estas peĉakuĉo?

Peĉakuĉo estas prezentformato de mallongaj elpaŝoj, intence limigitaj je formo kaj daŭro. La celo de tiaj prezentaĵoj estas rapide konatigi la spektantojn kun diversaj interesaj ideoj, projektoj kaj temoj. Dum ĉi-jara SES ni planas okazigi 2 peĉakuĉojn: unu estos ĝenerala, kaj en la alia temos nur pri Esperantujo!

Reguloj de peĉakuĉo:

1. Via prezentaĵo (farita en la programo PowerPoint, LibreOffice Impress aŭ similaj) devas enhavi ĝuste 20 lumbildojn.
2. Ĉiu folio de la prezentaĵo estas montrata nur dum 20 sekundoj. Do, via akompana komento por ĉiu folio devas daŭri 20 sekundojn.
3. Suma tempo de prezentaĵo estas 6 minutoj 40 sekundoj.
4. Sur la foliojn de la prezentaĵo metu nur bildojn! Foje eblas aldoni titolojn — sed mallongajn.
5. Via rakonto ne dublu la informon sur la folioj de prezentaĵo.
6. Post prezentaĵo vi havos 6 minutojn kaj 40 sekundojn por respondi demandojn de la spektantoj. Sendu viajn prezentaĵojn al ses@ikso.net!

Por pli da informoj pri peĉakuĉo, vidu nian Facebook-paĝon.

Gvidas: Kryštof Klestil kaj Miri

Pola lingvo por komencantoj

“Litovio! Patrujo mia!” Simile al sano, lingvo estas ne nur libroj. En mia leciono vi povas lerni kelkajn bazajn informojn kaj rimarki la belecon de la pola lingvo.

Prelegas: Kamil Getka



Pri elektra energio

Ĉu vi iam interesiĝis pri elektra energio? Kio ĝi estas? Kiel ĝi funkcias? Kial ĝi funkcias? Ni rigardos bazajn principojn laŭ kiuj funkcias elektra energio, kaj kiel funkcias elektra reto. Ni faros kelkajn eksperimentojn. Kaj espereble konektos enuan fizikon de bazlernejo kun praktika uzo en ĉiutaga vivo. Tiuj, kiuj konas nenion pri fiziko, estas bonvenaj!

Prelegas: Martin Sedlák

Rusa lingvo

La rusa lingvo estas la plej granda slava lingvo laŭ la nombro de parolantoj. Ĝi estas oficiala aŭ vaste parolata lingvo ne nur en Rusio, sed ankaŭ en kelkaj aliaj landoj. Krome, en ĝi estis verkita abunda literaturo, kreitaj multaj filmoj kaj kantoj. Sendepende de la kialo, por kiu vi volus eklerni la rusan lingvon, ĉi-tiu lingvokurso estus utila por vi. Mi lernigos al vi la rusan skribsistemon kaj ni ekzercos kelkajn utilajn frazojn kaj esprimojn. Krome, vi havos ŝancon por ekkoni iom da interesaĵoj pri la lingvo kaj la rusa kulturo.

Prelegas: Konstantin Tikhomirov

Sed mi ŝatas malpravi!

Kiam vi klopodas ŝanĝi ies opinion aŭ konvinki iun pri io ajn, vi verŝajne jam rimarkis, ke simple prezenti faktojn kaj pruvojn ofte estas senefike, ĉu temas pri “klimatoŝanĝo estas mito” aŭ “vakcinoj kaŭzas aŭtisman” aŭ “Esperanto estas senutila ĉar neniu parolas ĝin”.

En tiu ĉi prelego, mi prezentos kelkajn psikologiajn trukojn – testitajn laŭ scienca metodo – por pli

efike komuniki vian mesaĝon al kontraŭulo. Venu kaj lernu kiel permesi kaj ebligi al via kunargumentanto ŝanĝi sian opinion.

Prelegas: Tim Morley

Seksneŭtrala esprimado en Esperanto

Ĉu vi iam bezonis paroli al granda amaso da homoj? Ĉu vi iam skribis leteron al nekonato? Ĉu vi ne volas scii kiel komuniki sen danĝero de diskriminacio aŭ ofendo? La jena prelego montros al vi eblajn direktojn por neŭtrala komunikado jam en nuntempa Esperanto.

Prelegas: Václav Zouzalík

Superregaj teknikoj

Homoj en pozicioj de povo tre ofte uzas, konscie aŭ nekonscie, kelkajn superregajn teknikojn ĝuste por teni sin en tiuj pozicioj. La teknikoj do estas uzataj ekzemple kontraŭ virinoj, junuloj, neblankuloj kaj aliaj grupoj. En ĉi tiu sesio vi lernos kiel rekoni la teknikojn, sed ankaŭ kiel kontraŭi kaj preventi ilin. La sesio utilis interalie por ĉiuj, kiuj aktivas en iu organizo.

Prelegas: Paulína Kožuchová

Suprasoraba lingvo

La suprasoraba lingvo estas unu el du malgrandaj okcidentoslavaj lingvoj, parolataj en orienta Germanio. Ĝia parolantaro egalas pli-malpli 50 000 personojn, ĉefe loĝantaj ĉirkaŭ la urbo Budyšin (Bautzen). La lingvo posedas unikan fonologion kaj kelkajn aliajn gramatikajn kaj leksikajn trajtojn, kompare kun la aliaj slavaj lingvoj. Kvankam mi mem nur iomete parolas la lingvon, mi volonte kundividos kun vi miajn lernospertojn, lernigos la alfabeton kaj skribmanieron kaj instruos bazajn konversaciajn unuojn.

Prelegas: Konstantin Tikhomirov

Svahila lingvo

La svahila lingvo estas lingvo apartenanta al bantua lingvaro. Ĝi devenas el Zanzibaro, insularo troviĝanta en Tanzanio. Ĝi estas parolata en multaj landoj de subsahara Afriko. Inter 30 kaj 60 milionoj da personoj ĝin uzas kaj ĝi estas oficiala lingvo en Tanzanio, Kenjo, Burundo, Ugando, Ruando kaj Kongolando. Nuntempe, la svahila lingvo estas instruata en multaj universitatoj de la mondo. Ni lernos kelkajn bazajn vortojn kaj simplajn frazojn, kiuj estas famaj kaj eĉ kune kantos la faman kanton *Malaika*, kiu signifas “anĝelo”.

Prelegas: Jérémie Sabiyumva

Teatra studio

Mi invitas vin al la Teatra studio, kie en la unua tago ni elektos iun historion, interese ĝin perlaboros, elektos la stilon kaj la formaton, kaj en kelkaj sekvaj tagoj ni gaje provludados la teatraĵon, kiun ni furore prezentos dum la internacia vespero. Se la grupo estos sufiĉe granda, ni dividos ĝin al du grupetoj, kiuj aparte provludados kaj prezentos la saman historion diversmaniere. Mi jam antaŭĝuas!

Gvidas: Oleg Ĉajka

TEJO sin prezentas

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) estas organizo de junaj parolantoj de Esperanto kun individuaj membroj kaj landaj sekcioj en ĉirkaŭ 40 landoj. Ĉefa sidejo troviĝas en Roterdamo, Nederlando. Venu ekscii pli da informoj!

Prelegas: Clément Baleyte

Trejnado por anĝeloj kaj helpemuloj

Kion signifas flavaj ŝildoj? Kie estas akceptejo? Kiel mendi en trinkejo? Ni interkonatiĝos, priparolos diversajn situaciojn, kaj lernos kiel helpi al aliaj partoprenantoj aŭ kion fari se ni mem bezonas helpon. Flava ŝildo ne estas nur peco de papero, ni estu aktivaj. ☺

Gvidas: Miri

Vaksaj tukoj ☺



En kuirejo ni kutime uzas multajn plastajojn. Domaĝe, ĉefe ĉe stokado de manĝoj temas pri nur 1-foje uzablaj materialoj, kiujn ni poste forĵetas. Unu vaksa tuko tamen anstataŭigas amason da plastaj saketoj kaj folioj, papertukoj kaj aluminifolio. La vaksa tuko estas tute ekologia, facile purigebla kaj danke al vakso kontraŭbakteria. Preparu vian propran, kiun vi hejme uzos por stoki restojn de tagmanĝo, por protekti



panon kontraŭ sekiĝo aŭ por paki manĝeton antaŭ vojaĝo. Ekzemple antaŭ vojaĝo al sekva SES, ĉar unu vaksa tuko reuzeblas eĉ dum unu jaro.

Gvidas: Katarína Nosková

Memzorgantejo

Kuirejeto por memzorgantoj kaj lavmaŝino troviĝas en la unua etaĝo de la studenthejmo.



Provizora programtabulo

	2019-07-12 – vendredo		2019-07-13 – sabato		2019-07-14 – dimanĉo		2019-07-15 – lundo		2019-07-16 – mardo	
Horoj	Alventago		Nacia tago		Lingva tago		Hobia tago		Ekskursa tago	
7:45-8:15			matena joko		matena joko		matena joko		Matenmanĝo	
7:30- 8:45			Matenmanĝo		Matenmanĝo		Matenmanĝo			
9:00-...			Instruado		Instruado		Instruado		Libera programo	
10:30-11:45			Kafpaŭzo (15 min.)		Kafpaŭzo (15 min.)		Kafpaŭzo (15 min.)		Tagmanĝo	
...-13:00			Instruado		Instruado		Instruado		libera programo	
13:00-14:00			Tagmanĝo		Tagmanĝo		Tagmanĝo			
14:00-15:00			siesto		siesto		siesto			
15:00-16:00	Alvenado, akceptado, enloĝigado.		Preleĝejo	Koncertejo	Aliloke	Preleĝejo	Koncertejo	Aliloke	8:45 – Tuttagaj EKSURSOJ (Bratislava / Banska Sliavnica) 13:45-19:00 EKSURSO Arboreto Myhany 15:30-19:00 EKSURSO (urba naĝejo de Nitro)	
			Kurso de la slovaka (Matthieu Desplantes)	Kurso de kroĉetado (Mir)	Ĉefa lingvo (Martin Sedlák)	Aŭrolo (Ewa Grochowska)	Ludo Magic the Gathering – historio kaj nuntempo (Marta & Konstantin Tikhonirov)			
			Genealogio – Mia familio-esplorado de Eŭropo ĝis Aŭstralio kaj Ameriko, de la 17a jarcento ĝis nun (Szabolcs Szilva)	Slovakaj popolkantoj (Mária Minichová)	Pola lingvo por komencantoj (Kamil Getka)	Kial ni malŝaltis Vikipedion: EU-reformo de kopirajto (Vaclav Zouzalik)	dancurso ĉaĉao (Kamil&Marta)			
16:00-17:00			13:45 EKSURSO perpleda Nitro							
17:00-18:00			Nitraj legendoj (Fejfi)	Teatra ateliero (Oĉjo Ĉajka)	Svahila (Jérémie Sabyumva)	Seriozaj ludoj (Salome Hug)	Teatra ateliero (Oĉjo Ĉajka)	Akrologo (Signe Capion & René Nielsen)		
18:00-19:00	Trejnado por anĝeloj kaj helpemulo	Lingva testado	Paroliga rondo – komencantoj	Paroliga rondo – progresantoj	Paroliga rondo – komencantoj	Paroliga rondo – komencantoj	Paroliga rondo – komencantoj	Paroliga rondo – progresantoj		
19:00-20:00	Vespermanĝo		Vespermanĝo		Vespermanĝo		Vespermanĝo		Vespermanĝo	
20:30-21:30	Oficiala malfermo		Popolmuzika koncerto de la familio Hlbocká		Muzika lingva kvizo		Koncerto: JoMo		Koncerto: Gabriel Pospíšil	
21:30-22:30	Interkona vespero		Vingustumado		Kuirarta festivalo (21:15 – 22:00 daŭro, 20:30 – preligo)		22:00-0:00 Prelego pri la filmo "The room" ("La Ĉambro") kaj sekve spektaklo de ĝi (Marta Nowakowska)		Ludo Vortoj (dancapliŝoj)	
22:30-...	Libera programo		Diskoteko		Karaokeo		Ludo Vortoj (dancapliŝoj)			

Taŭga por komencantoj – suitable for beginners

Tutsemajnaj programeroj: Libroservo (8:00-9:00, 14:00-19:00) | Trinkejo (17:00-00:00) | Gufujo (22:30-xx:xx)

Ĉiu prelego daŭru maks. 55 min. por havi paŭzon inter programeroj kaj liberigi la salanon por sekva programero

Provizora programtabulo

2019-07-17 – merkredo				2019-07-18 – ĵaŭdo				2019-07-19 – vendredo				20.7.2019 - sabato	
Horoj		Esperanto-tago		Faka tago		Sporta tago		Forira tago					
7:45-8:15		matena joko		matena joko		matena joko		matena joko					
7:30- 8:45		Matenmanĝo		Matenmanĝo		Matenmanĝo		Matenmanĝo				Matenmanĝo	
9:00-...		Instruado		Instruado		Instruado		Instruado				Instruado. Disdono de diplomoj.	
10:30-11:45		Kafpaŭzo (15 min.)		Kafpaŭzo (15 min.)		Kafpaŭzo (15 min.)		Kafpaŭzo (15 min.)					
...-13:00		Instruado		Instruado		Instruado		Instruado				Tagmanĝo	
13:00-14:00		Tagmanĝo		Tagmanĝo		Tagmanĝo		Tagmanĝo				Oficiala fino de la SES. Forveturado.	
14:00-15:00		siesto		siesto		siesto		siesto					
15:00-16:00		Prelegejo	Koncertejo	Aliloke	Prelegejo	Koncertejo	Aliloke	Prelegejo	Koncertejo	Aliloke			
		"Sed mi ŝatas malpravii" (Tim Morley)	E@l-novajtoj (Peter Baláž)	Esperanto-movado en Afriko (Jeremie Sabilyumva)	Seksnetrala esprimado en Esperanto (Vaclav Zouzalik)	"Vivu kaj lasu vivi" – prezento de TEVA kun disko (Dorota Rodzianko)		Esperanto-eventoj (Dorota Rodzianko)	Superregaj teknikoj (Paulina Kožuchová)	Ŝakturniro			
16:00-17:00		TEJO sinprezentas (Clément Baleyle)	Esperanto-literaturo (Peter Baláž & Oĉjo)	Vakŝajtoj (Katarina Noskova)	Pri elektra energio (Martin Sedlák)	Kirundia lingvo (Jeremie Sabilyumva)	Slovakaj popolkantoj (Mária Minichová)	Ĉu eblas eduki pri Esperanto en muzeo? (Maria Pokrzywnicka)	Openstreetmap (tuxayo)	Jogo (Min)	Sportaj konkursoj		
17:00-18:00		Peĉakuĉo "Esperantujo"	Teatra ateliero (Oĉjo Ĉajka)	Malgranda fina venko de Esperanto – kaj posta velko en Hungario (László Szilvási)	Ciferereca liberigo (tuxayo, Eda Nano)	Teatra ateliero (Oĉjo Ĉajka)		Peĉakuĉo "Generala"	Turniro "Magic the Gathering" (Marta & Konstantin Tikhomirov)	Akrojogo (Signe Caplon & René Nielsen)			
18:00-19:00			Paroliga rondo – komencantoj	Paroliga rondo – progresantoj	Ciferereca liberigo – daŭrigo (tuxayo, Eda Nano)	Paroliga rondo – komencantoj	Paroliga rondo – progresantoj			Paroliga rondo – komencantoj	Paroliga rondo – progresantoj		
19:00-20:00		Vespermanĝo				Vespermanĝo				Vespermanĝo			
20:30-21:30		Koncerto: Kaŝi				Internacia vespero				Adiaŭa vespero			
21:30-22:30		Diskoteko	Ludo Vortoj (dancapliŝoj)		Kinejo	Ludo Vortoj (dancapliŝoj)		Diskoteko	Koncerto: Eva band		Ludo Vortoj (dancapliŝoj)		
22:30-...													





Vespera programo Koncertoj

Familio Hlbocká

La familio Hlbocká estas folklora ensemblo konsistanta el dek membroj: du gepatroj kaj ilia ok infanoj. Dum ilia koncerto, vi aŭdos popolajn kantojn el diversaj regionoj de Slovakio kaj malkovros nekutimajn instrumentojn, inkluzive de fujaro, la plej tipa slovaka instrumento.



JoMo

JoMo (t. e. Jean-Marc Leclercq) estas franca kantisto kaj esperantisto. Li venas de Liono, nun loĝas en Tuluzo. Antaŭe li estis kantisto en la grupo Les Rosemary's Babies (La Rozmariaj Beboj).

Li montras rimarkeblan progreson al lingvodiverseco pere de muziko. Li havas tradician kaj rokan kantrepertuaron en 22 lingvoj, interalie Esperanto. Per tio li eniris la Guinness-libron pri rekordoj. Dum SES li etosigos kaj dancigos vin per siaj diverslingvaj kantoj, plenaj je ĝojo kaj energio.

Kaŝi

Kaŝi (veranome Carsten Schnathorst) estas germana muzikisto kaj esperantisto. Li venas de Osnabrück kaj loĝas en Hamburgo. Tie li ludas ĉe la bando The Living Music Box. Carsten kantas kaj ludas pianon. Lia kantaro enhavas proprajn kantojn kaj bone konatajn el la tuta mondo.

Dum SES li mojosigos la korojn de la publiko per sia mikso de propraj esperantaj kantoj, internacia furora muziko kaj aliaj konataj Esperanto-kanzonoj kaj pere de sia markanta voĉo.



Aliaj vesperaj programeroj

Internacia kuirarta festivalo ☺

Ĉu vi interesiĝas pri la kulturoj de la mondo? Jen oportuno ekkoni la gustojn de aliaj landoj. Dum la festivalo vi povos senpage elprovi diversajn eksterlandajn specialaĵojn. Por sukcesa festivalo, ĉiu partoprenanto kunportu ion de sia lando (manĝeton, sukeraĵon/kukon/keksojn, trinkaĵon, alkoholaĵon, ktp.). Plej bonas famaj aŭ strangaj aferoj (aŭ ambaŭ), kiujn oni ne sukcesas aĉeti eksterlande. Ĉiu lando havos tablon por prezenti la kunportitaĵojn kaj la ĉambro iĝos bazaro de mal-samaj gustoj.



Muzika lingva kvizo ☺

Ĉu vi scias, kiel sonas la finna, la serba aŭ la korea? Ĉu vi bone scipovas distingi diversajn lingvojn? Testu viajn kapablojn rekonante la lingvojn de diversaj kantoj! Por la plej lertaj lingvemuloj estos premioj.





Internacia vespero ☺

Dum internacia vespero amuzas la partoprenantoj la partoprenantojn. Dum ĉi tiu vespero vi havas eblon (kaj unikan, neripeteblan ŝancon) prezenti al aliaj vian talenton, viajn kapablojn, vian artemon. Elektu kanton, dancon, deklamadon aŭ ion alian, kaj prezentiĝu kun via programero – por ke la vespero estu vere amuza kaj internacia. Jam anticipe kontaktu gvidantojn pri la detaloj.

Adiaŭa vespero ☺

Lasta vespero de SES devas esti la plej bona! ☺ Ni disdonos kelkajn premiojn, ne rajtas manki la SES-kanto, statistiko pri la aranĝo, adiaŭoj, dankoj kaj kompreneble – bonega etoso kaj loooonga amuziĝo lastnokta.

Aldonaj programeroj

Paroligaj rondoj ☺

Ni rekomendas al vi ĉiuj partoprenadi ilin – se vi volas plibonigi vian lingvo-nivelon, ekzerciĝi pri komunikado kaj parolado en Esperanto, la paroligaj rondoj (ĉiuvespere) estas ĝuste por vi! Nepre kontrolu sur la program-tabulo la lingvo-nivelon kaj klason, en kiuj ili okazas!

Sportumado ☺

Dum la tuta aranĝo estas je via dispono diversa sport-ekipaĵo kaj eblo sporti. Senpage disponeblas: tablotenis, teniso, badmintono, tabla piedpilko, uzado de sportejo.

Bv. kontakti organizantojn aŭ viziti la organizan ĉambron, por ricevi tie la sportan ekipaĵon.

Prizorgas la sportan programon: Michal Grodza

Trinkejo ☺

Ĉiutage ĝis la nokto-nokto-fin' estos malfermita la trinkejo kun bongustaj drinkaĵoj, kie vi povos pasigi vian tempon antaŭ kaj post la koncertoj, aŭ dum la tago, se vi enuus. ☺ Afablaj trinkestroj garantias la bonan etoson. ☺



Diskejo ☺

Dum pluraj noktoj atendas vin diskotekoj kun internacia muziko de diversaj muzikstiloj. En la diskejo, organizata en la koncertejo, vi havos eblon eluzi vian energion, se ajna restos al vi post la tuta tago. ☺ Amuzemaj kaj dancemaj partoprenantoj, nepre venu kaj etosigu la noktan vivon dum SES!

Gufujo ☺

Tradicia ejo de Esperanto-aranĝoj: teejo, kun eblo trankvile, en silento ĝui la etoson, babili kun amikoj, ripozi, gustumi teojn. Ĉu diskejo tro bruas por vi? Do jen la gufujo – la ĝusta loko por vi!

Je via dispono do estos ĉio bezonata en Gufujo (teoj, akvo, kuketoj ktp.).



Kinejo ☺

Dum pluraj vesperoj estos projekciataj filmoj kun Esperanto-subtekstoj. Atendas vin diversaj specoj de filmoj – fabeloj, dokumentaj filmoj, komedioj, scienc-fikcio. La programo de la filmoprojekciado estos afiŝita surloke.

Libroservo ☺

Dum la tuta SES ankaŭ ĉi-foje atendos vin riĉa libroservo; en ĝi vi havos unikan eblon aĉeti tre diversajn Esperanto-varojn. Libroj, KD-j, DVD-j, T-ĉemizoj, insignoj, glumarkoj — ĉio tio kontraŭ tre favoraj prezoj. Profitu la eblon riĉigi vian E-kolekton kaj vizitu la libroservon!



Koverta poŝto ☺

Aranĝu vian propran poŝtkeston ĉe SES! Prenu kovrilon, subskribu kaj ornamu ĝin laŭ via plaĉo. Pendigu ĝin sur la afiŝmuron kaj via komunikado kun aliaj uzantoj de SES povas komenciĝi. Vi povas skribi (lasi mesaĝojn) al aliaj partoprenantoj kaj ili povas skribi al vi. Bonega metodo, precipe por komencantoj, kiel komenci komuniki en Esperanto.

P.S.: Bonvolu ne enmeti spamon :-)



Ekskursoj

Duontagaj ekskursoj

Urbo kaj kastelo Nitra (perpiede)

(8 EUR, 2019-07-13)

Nitra estas la plej malnova urbo de Slovakio, kiun kronikoj mencias jam en la 9-a jarcento. La unua skriba mencio devenas el 828, kiam Nitra estis episkopejo de la Grandmoravia Regno. Nitra estas urbo kun eksterordinara historia graveco. Komencoj de ĝia setlado estas en pratempo, kiel pravas la arkeologiaj troviĝoj sur la urbo-teritorio. Jam antaŭ 30 mil jaroj ĝi estis dense loĝata areo. La areo de la nuna Nitra estis grava loko de keltoj (jam kelkajn jarcentojn antaŭ Kristo), pli poste de ĝermanoj kaj fine slavoĵ. Ĝi estis sidejo de la unuaj konataj regantoj de la nuntempa regiono de Slovakio – ĝermanaj triboj “kvadoj” (ĉ. j. 396 p.K.) kaj ekde la 8-a jarcento ĝis 1108 sidejo de la Nitra-princlando.

La plej fama historia memoraĵo kaj dominanto de la urbo estas kastelo el la 11-a jarcento, en la 15-a jarcento rekonstruita kaj ankoraŭ ŝanĝita en baroka epoko. La kastelo estis konstruita sur la loko de la slava setlejo de la 9-a jarcento. Ĝi estas nacia kultura heredaĵo. Hodiaŭ ĝi estas sidejo de la arkeologia departemento de la Slovaka Akademio de Sciencoj kaj de episkopo. Viziteblaj estas nur la katedralo kaj la dioceza muzeo.



Topoľčianky

(20 EUR, 2019-07-18)

Topoľčianky estas ne tre granda urbo, sed tamen kun multaj vidindaĵoj. La unua skriba mencio pri la urbo estas el la jaro 1293. Tamen jam en la 6-a kaj 7-a jarcentoj tie loĝis slavoĵ. La ekskurso havos buntan programon, ni provos viziti ĉion vidindan:

- Vin-produktejon (kun vingustumado): la vinproduktejo Topoľčianky produktas 5 milionojn da litroj da vino jare, kaj per tio ĝi estas unu el la plej grandaj vinfarantoj en Slovakio;



• Kastelon el la 15-a jarcento: ekde la jaro 1890 la posedaĵon aĉetis Habsburga familio, kiu posedis ĝin ĝis la disfalo de la monarkio. Jozefo Aŭgusto Habsburga tre ekŝatis la lokon, riĉigis la ekipaĵon de la kastelo, grandigis la parkon, fondis la ĉevalojn kaj ĉeval-bredejon kaj la ĉasistan kastelon. Post la disfalo de monarkio la kastelon aĉetis la registaro de Ĉeĥoslovakio kaj ĝi iĝis somera sidejo de la prezidentoj de Ĉeĥoslovakio. Regule tie estadis ĉefe prezidento Tomáš Garrigue Masaryk. La kastelo estas nacia kultura heredaĵo.

Arboreto Mlyňany

(15 EUR, 2019-07-15)

La arboreto Mlyňany de Slovacia Akademio de Sciencoj (arboreto – kolekto de arbospecioj) estas protektita areo ĉe la vilaĝoj Tesárske Mlyňany kaj Vieska nad Žitavou (distrikto Zlaté Moravce). Ĝi okupas 67 hektarojn. En la jaro 1951 ĝi estis deklarita kiel protektita areo. Nuntempe ĝi estas scienca laborloko de Slovacia Akademio de Sciencoj.

La fondinto D-ro Štefan Ambrózy-Migazzi el Hungario estis ekde sia infanaĝo granda ŝatanto de botaniko. Kun sia edzino el Zlaté Moravce, Antónia, li konstruigis kastelon apud Vieska nad Žitavou, rande de arbaro. Ĝuste en tiu ĉi arbaro li komencis provi planti unuajn alilandajn arbospeciojn.

Hodiaŭ la arboreto estas la plej signifa arbologia institucio en Slovakio. Ĝiaj kolektoj enhavas pli ol 2 300 arbospeciojn el Mediteraneo, Ameriko, Afriko kaj Azio.



Tuttagaj ekskursoj

Bratislavo

(30 EUR, 2019-07-16)

Vizitotaj lokoj: burgruino Devín, Bratislava kastelo, malnova urboparto kaj io pli...

Bratislavo estas la ĉefurbo kaj la plej multe loĝigata urbo de Slovakio (pli ol 425 mil loĝantoj). En la urbo havas sidejon la ŝtatprezidento, registaro, parlamento, diversaj oficejoj kaj ministerioj, ankaŭ pluraj universitatoj, teatroj, muzeoj kaj aliaj kulturaj kaj sciencaj institucioj. Bratislavo situas sur ambaŭ bordoj de la rivero Danubo, sur montarpiedo de Malgrandaj Karpatoj. La urbo estas proksima al Ĉeĥio, Aŭstrio kaj Hungario. Ĝi estas la unusola ĉefurbo en la mondo, kiu limas samtempe kun du landoj (Hungario kaj Aŭstrio).



Banská Štiavnica

(30 EUR, 2019-07-16)

Banská Štiavnica estas historia urbo en meza Slovakio, kun tre multkultura pasinteco. Ĝi estas konata pro minado de metaloj (ĉefe de arĝento), gravaj minejaj juro, administracio kaj akademia tradicio. Ni spertos malsupreniron en subteran minejon en la Subĉiela Minmuzeo, ĉiu ekipita per kasko, lampo kaj mantelo. Post tagmanĝo en pensiono ni trarigardos la Malnovan Kastelon, vizitos mineralogian ekspozicion kaj la vendejon Verkoj de slovakiaj belartistoj. Nian ekskurson ni finos en la teejo Divná pani. La urbo mem estas enskribita en la Unesko-listo de kulturaj heredaĵoj.



Aŭspicio

Somera Esperanto-Studado (SES 2019) okazas sub la aŭpicio de:

Martina Lubyová, ministrino pri edukado, scienco, esplorado kaj sporto de la Slovaka respubliko;
Milan Belica, prezidanto de la memstara regiono de Nitra.

Partneroj

La evento okazas kadre de la Unesko-jaro 2019 – internacia jaro de indiĝenaj lingvoj kaj kun subteno de la urbo Nitra.



2019 | INTERNATIONAL YEAR OF
Indigenous Languages

SES-ejo



Sekvu nin en Facebook: <https://www.facebook.com/SomeraEsperantoStudado/>
Aliĝu al nia grupo en Telegram: <https://ses.telegram.org/>

Mapo

